

La lingva konflikto en Norvegio

Ĉu lecionoj por la skota lingvo?

Andrew Weir



Brita kaj Skota Esperanto-kongreso, Edinburgo, 21-a de majo 2017

Enkonduko

- Mi laboras kun lingvo en Norvegio...
- ...kie la lingva situacio estas aparte interesa.
- Ŝajnas ankaŭ esti granda kvanto de similaĵoj kun la skota situacio.
- Mi priskribos la norvegan situacion, kaj mallonge skizos rilaton kun Skotlando kaj la situacio tie ĉi.

La lingva situacio en Norvegio

Êu estas unu norvega lingvo?



Multaj parolataj dialektoj

- Kiel en multaj landoj, estas multaj dialektoj kiuj uzatas tra tuta Norvegio.

Hva heter den jenten?

Kva heiter den jenta?

Ka heite hun jenta?

Ka ho jenta heite?

“Kiel nomiĝas tiu junulino?”

Multaj parolataj dialektoj

- Malkiel multaj landoj, ĉiuj dialektoj estas konsiderataj kiel **egalaj** – kaj surpapere, kaj en la realo.
 - Norvegoj estas fieraj pri siaj dialektoj, kaj emas ne ŝanĝi la parolmanieron en iuj ajn kontekstoj.
 - Parlamentanoj, profesoroj, TV-novaĵelsendistoj ktp. – ĉiuj normale uzas sian propran dialekton.
- ➔ **...parole.**

Skribado

- Oni eĉ skribas dialekte en certaj neformalaj cirkonstancoj (notoj, tekstmesaĝoj, Facebook...)
- Sed en iuj oficialaj kontekstoj, oni devas skribi “laŭ la regularo”, samkiel en aliaj landoj.
- Sed estas **du** regularoj.

Du skribmanieroj

Bokmål (Librolingvo)

Alle mennesker er født frie og med samme menneskeverd og menneskerettigheter. De er utstyrt med fornuft og samvittighet og bør handle mot hverandre i brorskapets ånd.

Nynorsk (Nov-norvega)

Alle menneske er fødde til fridom og med same menneskeverd og menneskerettar. Dei har fått fornuft og samvit og skal leve med kvarandre som brør.

(Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduti unu al alia en spirito de frateco.)

Kial du skribmanieroj?

Iom de la historio

- La skandinavaj lingvoj, inkluzive la norvega, venas de la norena (malnovskandinava) lingvo.
- En (nuna) Norvegio parolatis okcident-norena, en Danio kaj Svedio – orient-norena



Dana rego en Norvegio

- Inter 1521 kaj 1814, Norvegio estis en unio kun Danio – pli-malpli regata de Danio, efektive.
- Norvegio havis iujn proprajn instituciojn, sed la centro de povo, influo kaj ekonomio estis Kopenhago en tiu ĉi periodo.

La dana lingvo en Norvegio

- La lingvo kiu uziĝis de la burĝaro en Norvegio do estis la dana.
- La dana uziĝis en administracio, edukado, ktp. – precipe skribe.
- Tia uzo de la dana skribe influis la parolan lingvon de tiu burĝa klaso ĝiscertagrade
- La lingvo de la kamparanoj, tamen, restis iom aparta kaj neinfluita en la sama maniero.

Sendependiĝo kaj naciismo



- En 1814, Norvegio sendependiĝis de Danio.
 - Post mallonga milito, Norvegio tuj eniris personan union kun Svedio, sed krom la komuna monarĥio kaj eksterlandpolitiko, ĝi estis esence sendependa lando.
 - La novtrovita sendependeco, post multaj jaroj sub dana rego, kaŭzis la floradon de norvega naciismo kaj strebojn difini la novan landon.
- ➔ Romantikista periodo

Disvolviĝo de la lingvo


- En tiu ĉi periodo, estis ankaŭ debato pri la lingvo kiun la nove sendependa lando uzu.
- Estis multe kiuj konsideris netaŭge la daŭran uzon de la dana.
- Sed la parola lingvo de la norvega burĝaro estis sufiĉe influita de la dana, dum la periodo de dana rego, ke ne estis grandegaj malsamaĵoj inter la dana kaj “klera ĉiutaga parolo” (*dannet dagligtale*).

Kia lingvo uziĝu

La nova lando havis plurajn eblajn elektojn:


- daŭre uzi la danan
- uzi lingvon kiu baziĝis de la dana sed iom “norvegigita” – versio de “klera ĉiutaga parolo/*dannet dagligtale*”
- krei novan norman/skriban lingvon bazitan de la “vera” norvega – la norvegaj dialektoj kiujn uzis la kamparanoj.

Ivar Aasen (1813-1896)



Ivar Aasen

- Vojaĝis tra Norvegio 1842-1846
- Kolektis vortojn, esprimojn kaj gramatikajn trajtojn kiuj troviĝis en la kamparanaj dialektoj (precipe en la montaroj kaj fjordoj en la okcidento), sed ne ĉe la burĝoj/en la dana.
- Uzis tiun esploron kiel bazon por nova lingvo:
 - *Det norske Folkesprogs Grammatik* (Gramatiko de la norvega popollingvo), 1848
 - *Ordbog over det norske Folkesprog* (Vortaro de la norvega popollingvo), 1850



Nynorsk naskiĝas

- Originale la kreaĵo de Aasen nomiĝis *landsmål* (landlingvo), sed en 1929 ŝanĝiĝis la nomo al *nynorsk* (nov-norvega).
- En 1885, la norvega parlamento proklamis du egalajn kaj kunoficialajn lingvoformojn en Norvegio:
- *bokmål* (aŭ *riksmål*: librolingvo/regnolingvo) – iom “norvegigita” versio de la dana-norvega/“klera ĉiutaga parolo”
- *nynorsk/landsmål*
- Kaj tiel restis la situacio ĝis nun.

Kompare

Dana

Alle mennesker er født frie og lige i værdighed og rettigheder. De er udstyret med fornuft og samvittighed og bør handle mod hverandre i en broderskabets ånd.

Bokmål


Alle mennesker er født frie og med samme menneskeverd og rettigheter. De er utstyrt med fornuft og samvittighet og bør handle mot hverandre i brorskapets ånd.

Nynorsk

Alle menneske er fødde til fridom og med same menneskeverd og rettar. Dei har fått fornuft og samvit og skal leve med kvarandre som brør.

Kiel la du variantoj kunekzistas?

Kiu varianto uzatas kie de kiuj?



- Ĉirkau 80-85% da norvegoj uzas *bokmål* kiel la preferata varianto;
- nur 15-20% prefere uzas *nynorsk*.

Edukado

- Ĉe lernejoj, lernas ĉiu junulo unu el la variantoj ĝis la fino de la oka lernejojaro (14-15-jaraĝaj)
 - *hovedmål/hovudmål* (ĉefa lingvo) – ĝenerale la ĉefa lingvovarianto de la komunumo kie troviĝas la lernejo, do precipe *bokmål*
- Ĝis ili finas la lernejajn studojn, ili studas krome la alian varianton
 - *sidemål* (flanka lingvo)
- Necesas montri kapablon en ambaŭ variantoj por sukcesi en fina ekzameno de norvega lingvo.

Amaskomunikiloj

- La granda plimulto de ĵurnaloj uzas (konservativan formon de) *bokmål*, kvankam foje kun iom *nynorsk*
 - ĝenerale: ju pli liberala/maldekstrema la ĵurnalo, des pli *nynorsk*
 - Sed, precipe en la okcidento, ekzistas *nynorsk*-aj ĵurnaloj
- La ŝtata dissendisto (NRK) laŭleĝe devas havi 25% da sia enhavo en *nynorsk*
 - esence: subtitoloj (ĉar la parola enhavo estas en la propra dialekto de la parolantoj)
- La privataj dissendistoj kiel regulo uzas nur *bokmål*.

Ĉiutaga uzo


- Norvegoj rajtas uzi la lingvoformon kiun ili preferas (kaj ricevi respondon de instancoj en la sama lingvo)
- La plimulto uzas *bokmål*
- En neformalaj cirkonstancoj (tekstmesaĝoj, Facebook, ...) ofte uzatas dialekto (nek *bokmål* nek *nynorsk*)

La lingva konflikto

Ideologio kaj stereotipoj

- *Nynorsk* = kultura heredaĵo? Reprezentas la “veran” Norvegion? Minoritata lingvo kiun necesas protekti?
- Aŭ pesto por lernejoj, senutila en la “vera mondo” ekster etaj cirkloj de naciistoj?
- *Bokmål* = uniiganta forto, komuna al la tuta lando komplemente al la parolaj dialektoj?
- Aŭ imperiista forto kontraŭ minoritata varianto? Esence fremda, apenaŭ-norvegigita dana?

Spynorsk mordliste



- Nynorsk estas sufiĉe nepopulara inter la 15-18-jaruloj kiuj devas lerni ĝin...
- *Nynorsk ordliste* (nynorsk-vortolisto)
 - ➔ spion-norvega murdolisto

La kampo por kaj kontraŭ nynorsk

Nynorsk er altså ikke så mye et språk, som et forsøk på å finne et minste felles multiplum av landets dialekter. Ikke helt ulikt et annet fiasko-språk: Esperanto.

Nynorsk do ne estas lingvo, sed male provo trovi plej malsupran komunan denominatoron de la dialektoj de la lando. Ne tute malkiel alia fiasko-lingvo: Esperanto.

<http://www.side3.no/la-oss-vre-enige-ta-livet-av-nynorsken-en-gang-for-alle/3422792366.html>

Parolu dialekte, skribu nynorsk!



La nuna situacio

- Estas organizoj kiuj reklamas por kaj *bokmål* kaj *nynorsk*.
- Estas daŭra debato pri la uzo de *nynorsk* en la publika sfero kaj en la lernejoj – sed ne ŝajnas, ke estos ŝanĝoj en la proksima estonteco.



RIKSMÅLSFORBUNDET



NOREGS MÅLLAG

Ĉu lecionoj por la skota?

La skota, tre mallonge

- La skota lingvo estis (iusence) la ŝtata lingvo de sendependa Skotlando antaŭ unio kun Anglio en 1707.
- Tuj post tiam, la skota lingvo komencis perdi la pozicion kaj lingvan sendependecon rilate la “norman” anglan.



Evidentaj similaĵoj...

- La skota lingvo havas evidentajn similaĵojn kun *nynorsk*.
- Lingvo de la kamparo, de radikalismo, de la “vera” lando (kompare kun la lingvo de alia pli suda lando)...
- Ne tute klare, ĉu temas pri alia “lingvo” ol la angla – sed certe estas varianto tre malsimila al la norma angla.
- Konstruita?

‘Sinteza skota’



- Praktiko en poezio enkondukita de la poeto Hugh MacDiarmid (1892-1978), dum la intermilitaj jaroj, kaj tre influa en la skota literaturo
- Ĉerpas vortojn el vortaroj kiuj eble ne plu estas uzataj, aŭ uzatas nur en kelkaj dialektoj
- Provas kolekti trajtojn de pluraj dialektoj

La lunhomo/The Man in the Moon

The moonbeams kelter i the lift,
An Earth, the bare auld stane,
Glitters aneath the seas o Space,
White as a mammoth's bane.

An, lifted owre the gowden wave,
Peers a dumfoun'ered Thocht,
Wi keethin sicht o a' there is,
An bodily sicht o nocht.

Ĉiele ondas lunradioj,
Kaj Ter', la ŝtono nuda,
Sub spacomaroj brilas blanka
Kiel ost' mamuta.

Kaj, super l' ora ond' levite,
miranta Pens' meditas
Kaj vidas ĉie spurmoviĝon,
nenion korpan vidas.

(trad. William Auld)

Pli da similaĵoj

- Evidente, tiu procezo similas la “konstruadon” de *nynorsk* fare de Ivar Aasen en la 19-a jarcento.
- Ĉu *nynorsk* povas doni ŝablonon por la skota?

Eblaj proponoj

- Instrui (pri) kaj la angla kaj la skota en lernejoj – ne (nepre) kiel malsamaj lingvoj – sed kiel variantoj kiujn oni majstru ambaŭ?
- Ebligu al lokaj instancoj la elekton inter la uzo de la skota aŭ la angla?
 - ekz. eble la nord-orienta parto de Skotlando pli emas uzi la skotan
- Parolu dialekte, skribu la skotan?

Iuj zorgindaĵoj

- Deviga studado de *nynorsk* estas (ofte) nepopulara ĉe lernejoj – eĉ kelkfoje ĉe tiuj, kies propra dialekto similas *nynorsk*
- Reago kontraŭ “konstruateco”
 - Ĉiu skriblingvo estas iusence “konstruata”, sed estas iom malfacile klarigi aŭ kredigi tion.
- Ĉu utila? (Ĉu ni ne pli bone uzu rimedojn por instrui la norman anglan kaj/aŭ fremdajn lingvojn?)

Konklude

